



Aŭroro

Sabato/Dimanĉo, 20-21 julio 2013

N-ro 1

SALUTMESAĜO DE LA ALTA PROTEKTANTO DE LA 98-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La idealo pri kuna socio, kreado kaj esprimado sendependa de etna aŭ nacia deveno akompanis Esperanton ekde la komenco, kaj danke al ĝi la movado iĝis unio por paco kaj humaneco.

Dum la nova jarcento la teknologio malfermis multajn dimensiojn en la mondo, translime konektis homojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj favoris la ŝanĝiĝojn en la mondo, inter kiuj la lukton por progresigi Esperanton. Sekve komenciĝas novaj tempoj kun ŝanco por sukcesoj pli diversaj ol iam ajn antaŭe.

La Universala Kongreso de Esperanto, okazanta nun en Harpa, estas ideala loko por atenti la estontecon, dum ni laŭdas la respektindan ĝisnunan laboron por Esperanto. Mi kore bonvenigas vin al la kongreso kaj deziras al la movado sukceson en la estonteco.

ÓLAFUR RAGNAR GRÍMSSON
Prezidanto de Islando

Senpaga retkonekto

La kongresejo provizas senpagan retkonekton al la kongresanoj. Por uzi ĝin oni devas elekti "Harpa-Conference-1". La pasvorto estas: Eldborg1.

Korekto pri Kleriga Lundo

En la laŭtaga programo de la Kongresa Libro, kaj ĝis lastatempe de la elŝutebla laŭtaga programo ĉe www.uea.org, salono Beleva estas listigita por la Kleriga Lundo-sesio gvidota de Kristin Tytgat, "Konsiloj por klare kaj efike komuniki en Esperanto", kiu tamen okazos en salono Broadribb, kiel ĝuste montras la programaj tabeloj kaj laŭalfabeta programlisto.

Grave pri la Kongresa Libroservo!

La prezoj en la Kongresa Libroservo estas indikitaj en eŭroj (EUR), sed la kontantaj pagoj okazos nur en islandaj kronoj (ISK).

Novajoj pri EEU-kunsidoj

Fermita kunsido de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) okazos dimanĉon posttagmeze (15h30-17h30) en la salono Björtuloft (kiu ne havas Esperantan nomon), atingebla per lifto ĝis la 5-a etaĝo. Tie dekstre de la lifto estas deklivo kiu kondukas onin ĝis la salono en la 6-a etaĝo. La publika kunsido de EEU okazos lundon (16h30-18h00) en salono Hirsch. La kunsido anoncita en la Kongresa Libro por vendredo (15h00-15h30 en salono Beleva) estas nuligita.

Foto de la Tago

Ĉu vi ofte fotas dum la kongresaj tagoj? Afiŝu viajn plej bonajn fotojn ĉe la virtuala galerio de la kongreso: http://www.flickr.com/groups/98-a_uk. La redakta teamo de la Kuriero elektos el ili la Foton de la Tago, kaj ankaŭ aliaj kongresanoj povos ĝui ilin. Necesas havi aŭ krei yahu-konton por uzi tiun servon.

Kleriga Lundo

lundon, la 22-an de julio 2013

UNUA BLOKO: 09h00-10h30

Kiel recenzi diskon

Paul Gubbins

Aperas ĉiumonate novaj kompaktdiskoj de Esperantaj kanzonistoj kaj aliaj muzikistoj. Ofte ilin ni ne rimarkas, ĉar mankas recenzoj. Kaj mankas recenzoj, ĉar homoj hezitas – eventuale pro nesperto pri la arto recenzi – surpaperigi siajn opiniojn, siajn impresojn. Ĉi tiu sesio esploros kiel recenzi KD-ojn same de teoria kiel, pli grave, de praktika aspektoj. Ni diskutos i.a. pri kio estas recenzo; ĉu, recenzante, ni esperantistoj tro indulgas niajn artistojn; kiom permeseblas de etika kaj jura vidpunktoj vere kritiki; kaj fine, surbaze de disaŭditaj muzikeroj ni verkos niajn proprajn, specimenajn recenzojn.

09h00-10h30, *Dao Anh Kha*

FACILA: Kanti kaj babili kun Manŭel

Emanuele Rovere (Manŭel)

Manŭel prezentos kelkajn el siaj kantoj kaj instigos vin kanti kune, sekvante simplajn videotekstojn kaj spektante kantofilmeton pri stranga kaj simpatia kato. Li ankaŭ instigos vin konversacii per simplaj vortoj, tiel ke ĉiuj trovos bonan ŝancon por facila kaj amuza babilado.

09h00-10h30, *Broadribb*

Unuiĝintaj Nacioj: cele al pli bona mondo

Humphrey Tonkin kaj Stefano Keller

Kiel ĉiuj politikaj organizaĵoj, UN estas komplika, malrapida, kaj plena je diversaj vidpunktoj. Sed ĝi faras valoran laboron, kiun la homoj ĝenerale nesufiĉe bone konas. La celo de tiu ĉi seminario estos klarigi la laboron de UN kaj montri kial esperantistoj devus sin engaĝi en tiun laboron, kaj kiel tion fari.

09h00-10h30, *Beleva*

Novaj projektoj de E@I kaj ilia utilo por Esperanto

Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus

Skiza prezento de la plej freŝaj aktivecoj de E@I – ĉu retaj projektoj, ĉu aranĝoj aŭ eldonaĵoj. Venu ekscii ĉion kion vi povos praktike utiligi kaj eventuale eĉ kunlabori. Prezentitaj estos projektoj: nova lernu.net, lingvo.info, deutsch.info, monda.eu, www.komputeko.net, www.vortaro.net (reta PIV), SES, KAEST, planoj por baldaŭaj projektoj ktp.

09h00-10h30, *Bormann*

Utiligado de Esperanto

HORI Jasuo

Esperanto estas tre utila por kolekti kaj disdoni diversajn informojn kaj novaĵojn, ĉar esperantistoj sinceraj kaj kleraj loĝas en diversaj landoj kaj respondas al diversaj petoj. Kaj tio estas la plej granda avantaĝo de Esperanto, kaj tion aliaj lingvoj ne havas. La preleganto montros, kion li faris okaze de la katastrofo en 2011 en Japanio.

09h00-10h30, *Hirsch*

DUA BLOKO: 10h45-12h15

Kunkreu elsendon por Muzaiko!

Volontuloj de Muzaiko (Julia Noe, Veronika Poór, Rafael Henrique Zerbetto kaj aliaj)

Muzaiko (www.muzaiko.info) estas tuttempa tutmonda tutmojosa tutesperanta retradio-kanalo, kiu ludas por vi 24 horojn en diurno muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn, arkivaĵojn kaj multe pli! Ĉu vi havas ion por diri al la tuta mondo? Jen ebleco por vi tion fari. Dum la sesio jam spertaj kontribuantoj de Muzaiko helpas vin lerni kiel – de la registrado ĝis la alŝutado de la preta elsendo. Oni eĉ kreos veran elsendon, laŭtlegante tekstojn. Venu por spertiĝi kaj krei! Se eblas, kunportu al la sesio komputilon kaj kapaŭskultilon, kaj, se vi havas, mikrofonon aŭ sonregistrilon.

10h45-12h15, *Dao Anh Kha*

Tradukado multlingva

Brian Moon

Ĉar ni ne uzas nian lingvon en glora izoligo disde la cetera mondo, ĉiu uzanto de Esperanto pli-malpli ofte konfrontiĝas kun problemoj de tradukado inter Esperanto kaj naciaj lingvoj. Por reliefigi la interlingvajn problemojn el iom alia perspektivo, mi proponas konsideri la situacion en multlingvaj organizaĵoj kiel Eŭropa Unio.

Surbaze de praktika tradukado de specimena teksto jam ekzistanta en diversaj lingvoj, inkluzive de la islanda, ni iom esploras la avantaĝojn kaj la problemojn de Esperanto en tiu ĉi kampo.

10h45-12h15, *Broadribb*

Ni konservu nian historion: problemoj de Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj

Detlev Blanke kaj Roland Rotsaert

La aranĝo prezentos kaj diskutigos la aktualan situacion de Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj (kolektoj), substrekos la rolon de la reto, kaj mencias kelkajn statusajn (i.a. jurajn) aspektojn, kiuj influas la perspektivojn de la kolektoj.

10h45-12h15, Beleva

Esperanto kaj Interreto: kiel ilin kune uzi pli efike

Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus

Baza prikomputila instruado kun la fokusiĝo al Esperanto – prezento de retaj aktivecoj aŭ programoj, kiuj utilas por E-istoj: kiel pli efike serĉi informojn en la reto; kiel tajpi ĉapellitere; kie kaj kiel serĉi E-enhavon; kaj aliaj bazaj scioj, utilegaj por e-istoj.

La sesio taŭgas por ne-spertaj uzantoj de komputiloj aŭ/kaj de la reto. Se eble kunportu propran komputilon.

10h45-12h15, Bormann

Bona IDEO: realigo de Grundtvig-projekto

Mirejo Grosjean kaj Claude Nourmont

Dum du jaroj kvar Esperanto-asocioj el malsamaj landoj (Francio, Germanio, Katalunio, Svislando) partoprenis en Grundtvig-projekto subvenciita de eŭropaj instancoj laŭ la temo: Interkultura edukado, defio por diverseca Eŭropo (IDEO). Tiu ĉi sesio prezentos la diversajn etapojn de la projekto kaj ĝian rezulton: la retpaĝaro www.noos.ch/ideo. Oni ankaŭ diskutos pri la diversaj problemoj kiujn oni renkontas en tiaj projektoj.

10h45-12h15, Hirsch

TRIA BLOKO 12h30-14h00

Klerigaj ludoj en Kleriga Lundo

Ana Montesinos

Ĉu lernado devas esti enuiga kaj seka? Kompreneble, tute ne. Sed se oni ĝin ĝuas, multe pli bone, ĉu ne?

Do, se via vortprovizo iomete rutinas, vi ankoraŭ timas paroli, frazoj ne tre facile fluas, aŭ tute simple vi volas praktiki Esperanton per historietoj ktp, kuraĝu kaj venu, ĝuu – kaj jes, ankaŭ lernu – kune kun ni per la “Klerigaj ludoj en Kleriga Lundo”.

12h30-14h00, Dao Anh Kha

“Ĉu mi bone komprenas vin?”

Konsiloj por klare kaj efike komuniki en Esperanto

Kristin Tytgat

Sukcese komuniki kun ĉiuj esperantistoj de la

mondo ne estas facila tasko, eĉ se ni ĉiuj parolas unu komunan lingvon.

Ĉar la alia persono en la konversacio eble venas el por vi tute ne konata kulturo, li aŭ ŝi povas reagi strange al via mesaĝo kaj povas kompreni vin en tute alia maniero.

Dum tiu ĉi sesio ni uzos konkretajn ekzemplojn kaj provos trovi kelkajn ĝeneralajn konsilojn, kiuj helpas pli klare kaj efike komuniki.

12h30-14h00, Broadribb

FACILA: En la spuroj de Tibor Sekelj: de Nepalo al Akonkagvo

Amri Wandel

Perbilda facila prelego pri kelkaj el la vojaĝoj de Amri Wandel (Nepalo, Kilimanĝaro kaj laste Akonkagvo), laŭ la spuroj de Tibor Sekelj, la plej fama esperantista vojaĝanto. Grimpante la plej altan monton en Ameriko, la preleganto sekvis la faman libron de Sekelj, *Tempesto super Akonkagvo*.

12h30-14h00, Beleva

Malkovru la novan lernu.net

Erin Piatieski

lernu! ekzistas jam pli ol 10 jaroj. Kun 150 000 registritaj uzantoj kaj 150 000-200 000 vizitantoj ĉiumonate, lernu! estas la plej efika varbilo por Esperanto. Dum la tuta ekzisto lernu! unu fojon estis renovigita teknike kaj aspekte, kaj nun venas tempo por ankoraŭ unu renovigo. Ĉi-foje ĝi estos ege profunda kaj plene ŝanĝos kaj la enhavon kaj la teknikan flankon de la projekto. La preparoj de la nova versio jam venas al la fino kaj la projekto bezonas helpon de multaj personoj. Dum la prezento oni ekscios pri la venantaj ŝanĝoj, konatiĝos kun la nova enhavo, kaj ekscios pri la kunlabor-ebloj.

12h30-14h00, Bormann

Kiel popularigi la Esperanto-literaturon

Michela Lipari, Humphrey Tonkin, HORI Jasuo, Veronika Poór, USUI Hiroyuki, Paul Gubbins...

Ni ĉiuj fieras pri la diverseco de verkoj en Esperanto kaj la multeco de libroj, kiuj aperas en nia lingvo. Tiuj libroj vendiĝas, eĉ se malgrandkvante. Sed kiu fakte legas Esperanto-literaturon? Kaj ĝis kiu grado ekzistas komunumo de legantoj, kiuj interŝanĝas siajn opiniojn pri la enhavo kaj kvalito de nia literaturo? Sen tiu vigla komuna kulturo, literaturo apenaŭ povas vivteni sin. Kion fari por intensigi la legadon de nia literaturo, la interŝanĝon de opinioj kaj ideoj pri ĝi, kaj la moralan subtenon al niaj verkistoj?

12h30-14h00, Hirsch

Aŭtoraj Duonhoroj (en la libroservo, salono Laŭlum)

Nikolao Gudskov



Mi estas relative malnova (ekde 1982) esperantisto, kaj iama sciencisto, kiu sentas mankon de la scienc-populara komponanto en la Esperanto-kulturo kaj penas laŭ miaj malgrandaj fortoj ŝtopi tiun ĉi truon. Mi rakontos pri du miaj lastaj scienc-popularaj libroj: *Origino de la vivo sur la Tero* kaj *Kiel la homo ekis pensi. Eseoj pri la helena filozofio* kaj, krome, parolos pri ĝeneralaj konsideroj pri la scienc-populara literaturo en nia lingvo.

Lundo 15h00-15h30

Nicola Ruggiero



Italo, naskiĝis en 1986 en Mola di Bari, Apulio, suda Italio, nuntempe loĝanta en Rejkjaviko. Publikigis *La Taglibro de Nenifaranto*, poemaron, kaj "La ĉerizarboj de Lucullo", eseon en *La lingvo serena*, plenverkaro de Baldur Ragnarsson. Prelegis pri *La Infana Raso* kaj pluraj Esperantaj aŭtoroj dum multaj E-renkontiĝoj. Plukredas loĝi en mis-tero.

Lundo 15h30-16h00

Roman Dobrzyński



Roman Dobrzyński naskiĝis okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto. Li intence elektis kiel sian naskiĝlokon Varsovion, ĉar en tiu urbo samjare okazis Universala Kongreso de Esperanto. Li naskiĝis kun la celo kunorganizi en la sama urbo 50 jarojn pli malfrue la Universalan Kongreson okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto. Li komencis lerni la lingvon internacian en la jaro 1955, ĉar la strategia plano de UEA antaŭvidis nomi lin sia honora membro pro lia 50-jara esperantisteco. Nun lia celo estas ĝisvivi la jubilean 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en Lille.

Lundo 16h00-16h30

Kongresanoj atentu:

Estas strikte malpermesite glui afiŝojn sur la muroj kaj pordoj de la kongresejo!

Anna Löwenstein



"Ĉu vi bonvolus verki rakonton, kiu taŭgus kiel baza Esperanto-kurso laŭ la nivelo A de la sistemo KER? Ho, kaj cetere, la rakonto estu ankaŭ interesa." Jen la peto, kiun mi ricevis pasintan jaron de la reta Esperanto-lernejo *lernu.net*. Kia defio! Plurfoje dum la verkado mi pensis senespere, ke mi akceptis neplenumeban taskon. Sed intertempe la rakonto estas finverkita. Dum la aŭtora duonhoru mi esperas pruvi al la mondo, ke eblas malfermi rakonton per atentokapta unua ĉapitro, uzante nur la gramatikajn finaĵojn -o, -a, kaj -as.

Lundo 16h30-17h00

Ĉu vi iru bicikle?



Legante pri la Rejkjavikaj hoteloj en la Dua Bulteno (paĝoj 5 ĝis 7), vi kredeble rimarkis ke neniuj el ili estas tuj apud la kongresejo, sed ke ĉiuj troviĝas inter 10 kaj 25 minutojn piede de ĝi. Por tiuj kiuj ŝatus pli rapide pendoli per biciklo, tamen, kaj eble promeni iom du-rade, montriĝas ke estas alte taksata bicikla luejo (<http://tinyurl.com/nk9q82o>, anglalingva) en la proksimeco de Harpa: Bike Company, 2 Bankastræti, tel. 665-5600, rete: info@bikecompany.is, www.bikecompany.is. Diverstipaj modeloj disponeblas, same kiel taga kaj tutsemajna tarifo.

Kvankam "Q" ne ekzistas...

...en la Esperanta alfabeto, la UK tamen denove provizas la kongresanojn per "QR"-kodaĵojn kiel tiu ĉi dekstre, per kiuj kongresanoj kun porteblaj telefonoj ekipitaj per QR-legiloj povas havi la Kongresan Kurieron en siaj telefonoj. Skanu tiun ĉi kodaĵon por la hodiaŭa numero (aliajn poste dum la semajno por la sekvaj), kaj vi ricevos ligilon al retpaĝo kie estas la Kongresa Kuriero, kiun vi povas legi kaj elŝuti al via telefono. Memoru tamen esti tre zorgema pri la kostoj por uzi Interreton ekster via hejmlando, kiuj povas esti tre altaj.

